



ESPERANTO AKTUALA



**INFORMILO DE LA BRUSELA ESPERANTO-GRUPO
ALIĜINTA AL BELGA ESPERANTO FEDERACIO**

ASOCIO SEN PROFITA CELO (MONITEUR/STAATSBLAD n° 6997 1979-06-21).

40 NIEUWE LEDEN IN EEN HALF JAAR!

Van onze penningmeester, de Heer E. Laduron, vernemen we dat ons ledenaantal sinds einde 1978 met meer dan 50 % gegroeid is. Op 20 juni kreeg onze vereniging haar 115-de lid. Laten we niet vergeten dat van 1977 naar 1978 ons ledenaantal eveneens met 1,5 vermenigvuldigd werd.

Aan al onze nieuwe leden zeggen we: wees welkom op al onze bijeenkomsten! De kursussen die nu vanwege de vakantie gestopt worden, zullen in september opnieuw beginnen. Ook onze lezingen en andere bijeenkomsten hebben dan weer plaats.

Indien U dit leest en nog geen lid bent, en U wilt toch regelmatig ons tijdschrift ontvangen, geef ons dan een seintje. Of nog beter, stort U direkt 50 Fr. op postrekening 000-0123048-52 van Esperantista Brusela Grupo, Sperwerlaan 86 bus 5, 1150 Brussel. U blijft dan op de hoogte van al onze activiteiten.

Ten laatste nog een woord van dank aan allen, die nieuwe leden geworven hebben. Zonder U zou de explosieve groei van onze vereniging niet mogelijk zijn. Dankzij U zullen we het Brusselse publiek steeds beter over Esperanto kunnen informeren.

Prettige vakantie !

F. Meijer

40 NOUVEAUX MEMBRES EN SIX MOIS !

Notre trésorier, Monsieur E. Laduron nous apprend que le nombre de nos membres s'est accru de plus de 50 %. Le 20 juin, notre groupement a acquis son 115-ème membre. N'oublions pas que de 1977 à 1978 notre nombre de membres s'était également multiplié par 1,5.

A tous nos nouveaux membres nous disons : soyez les bienvenus à toutes nos réunions ! Les cours qui sont suspendus à cause des vacances, recommenceront au mois de septembre. Nos conférences et nos autres réunions reprendront également à ce moment.

Si vous qui lisez ceci n'êtes pas encore membre, et si vous désirez recevoir régulièrement cette revue, faites-nous signe. Ou mieux, versez directement 50 Fr. au CCP 000-0123048-52 du Esperantista Brusela Grupo, Av. des Eperviers 86 boîte 5, 1150 Bruxelles. Vous serez alors toujours au courant de nos activités.

Pour terminer, nous remercions tous ceux qui ont amené de nouveaux membres. Sans vous, la croissance explosive de notre association ne serait pas possible. Grâce à vous, nous informerons toujours mieux le public bruxellois au sujet de l'Espéranto.

Bonnes vacances !

F. Meijer

KVARA INTERNACIA SOMERPIKNIKO.

Okazos : sabaton la 30-an de junio 1979 en Dilserbos.
 Programo : promenado, ludado, mirtelplukado, aŭ simple ripozado.
 Ĉe malbona vetero , speciala pluv-programo estos prizorgata.
 Ĉifoje, la atento speciale iros al la infanoj.
 Kunveno : en Stokkem antaŭ la preĝejo ĝis la 10-a horo.
 Partopreno : estas senpaga , sed oni anoncu sin kiel eble plej frue al
 S-ro J. Bovendeerd, telefono 02/513 80 90 int. 249 (dumdeĵore)
 aŭ 031/ 49 50 06 (vespere ekde la 19-a horo).

Antaŭan dankon kaj bonvenon.

Komunikis Limburga Esperanto-Centro.

RIPOZEGA RESTADO.

Franca Fervojista Esperantista Asocio (FFEA) jarkunvenos la 29-an kaj la 30-an de septembro (sabaton kaj dimanĉon) en kastelo Le Dourdy apud Quimper, Bretonujo. La programo de tiu semajnfino allogas enhavas promenadon, ekskurson, kamparan manĝon kaj bankedon kun i.a. marproduktoj...

Antaŭ tio, de la 24-a ĝis la 28-a de septembro , 20 aŭ 25 personoj povos restadi, je favora prezo , en komfortaj somerdometoj. La dometoj troviĝas en la parko de la kastelo Le Dourdy.

Informojn kaj aliĝilojn oni petu al : S-ro Raimond Steenhout, Pamelstraat 296, 9400 Ninove.

Komunikis L. De Sutter.

LA ASLK PROPONAS AL VI

KOMPLETAN

BANKAN SERVON

ĉiuj modernaj ŝpar-kaj invest-formoj

kurantaj kontoj kun eŭroĉekoj, hipotekorajtaj pruntedonoj,

persona kredito, vivasekuroj



ĝenerala ŝpar- kaj pensio-kaso

POURQUOI PAS L'ANGLAIS COMME LANGUE MONDIALE ?

Question : Pourquoi apprendre l'esperanto alors qu'on parle et comprend l'anglais partout dans le monde ?


Réponse: En effet l'anglais est actuellement très répandu et on ne peut s'en passer dans les domaines scientifiques et technologiques. Ce fut autrefois aussi le cas du français, et auparavant celui du latin, mais les facteurs historiques qui déterminent la prédominance d'une langue évoluent continuellement. Déjà maintenant on constate des réactions et des résistances à l'anglais. Les Russes, les Chinois, toute l'Amérique latine, l'Afrique francophone et les Français eux-mêmes ne se réjouissent pas tellement de la suprématie de l'anglais. A New York, l'espagnol a dû récemment être reconnu comme langue officielle. De plus si c'est une opinion généralement répandue chez nous, que tout le monde comprend et utilise l'anglais, qui est ce "tout le monde" ? En fait des universitaires, des diplomates, des hommes d'affaires, les cadres supérieurs des multinationales, qui ne représentent pas "tout le monde" ! Au contraire, combien de Belges sont capables de lire un journal anglais, de comprendre une émission télévisée en anglais, de transmettre ou de saisir en voyage une information quelque peu intéressante? Aussi déplaisant que cela puisse paraître, l'anglais est prédominant parce que les pays de langue anglaise exercent une domination politique et économique. Et cette langue par ailleurs si belle reste un puissant instrument dans les mains d'une élite technique et économique, qui en définitive statue sur notre mode de vie lui-même. En face de ces puissances impersonnelles et anonymes, le citoyen moyen se sent impuissant, parce qu'il est isolé de ses semblables par la barrière linguistique. Une considération plus égoïste : celui qui plaide pour l'anglais comme langue internationale donne aux peuples anglophones le plus beau cadeau qu'ils puissent imaginer et se désavantage lui-même (ce qui bien sûr est son droit) mais aussi ses enfants et petits-enfants. Nous reviendrons sur ce point dans un prochain numéro.

WAAROM NIET ENGELS ALS WERELDTAAL ?

Vraag : Waarom Esperanto leren terwijl Engels overal ter wereld gesproken en begrepen wordt ?

Antwoord : Engels is inderdaad tegenwoordig zeer verspreid en omnisbaar op het gebied van wetenschap en technologie. Dat was vroeger ook het geval met Frans, en nog vroeger met Latijn, maar de historische factoren die de overheersing van een taal bepalen evolueren voortdurend. Reeds nu tekenen zich reacties en weerstanden af tegen het Engels. De Russen, Chinezen, gans Latijns Amerika, het franstalige Afrika, de Fransen zelf, voelen zich niet zo gelukkig met de overheersing van het Engels. In New York moest onlangs het Spaans als officiële taal erkend worden en Florida en Californië zullen dit voorbeeld weldra moeten volgen. Verder is het wel een algemeen verspreide opinie bij ons, dat iedereen Engels verstaat en gebruikt, maar wie is die "iedereen" ? Alleszins universitaires, diplomaten, handelslui, het hoger personeel van multinationals, maar deze vertegenwoordigen nog niet "iedereen" ! Integendeel, hoeveel Belgen zijn in staat een Engelse krant te lezen, een TV-uitzending in het Engels te verstaan, op reis een nietwat interessante informatie te geven of te verstaan ? Het moge nog zo onsympathiek klinken, Engels overheerst omdat Engels-sprekende landen economisch en politiek overheersen. En die overigens zeer mooie taal blijft een machtig instrument in de handen van een technische en economische elite die uiteindelijk over onze levenswijze zelf gezag voert. Tegen deze onpersoonlijke, naamloze machten staat de doorsnee-burger machteloos, afgezonderd als hij is van zijn lotgenoten door de taalbarrière. Nu een meer egoïstische beschouwing : wie voor het Engels als wereldtaal pleit geeft de Engelssprekende volkeren het mooiste geschenk dat ze zich kunnen indenken en benadeelt zichzelf (wat natuurlijk zijn goed recht is) maar ook zijn eigen kinderen en kleinkinderen. Daarover meer in een volgend nummer.

PROBLEMO N°3.



HORIZONTALALE.

1. Por montri relative grandan amplekson de ago - Hejmo.
2. Kiel la haŭto de ŝafo - En tiu tempo.
3. Araba virnomo - Elementa peceto.
4. La ...-monatoj de Septembro ĝis Aprilo - Tute malklera homo.
5. Tuto de la disĉiploj de iu majstro.
6. Sankta bildo - Pronomo.
7. Prefikso montranta grandan primitivecon - Longa japana zono.
8. Balanceti per harmonia ir-reira movado - La libera spaco ĉirkaŭ k super ni.
9. Granda regno - Kunordiga konjunkcio.

VERTICALE.

1. Ekstera manifestado de doloro - Adverbo montranta la daŭradon k neceson de ŝtato aŭ ago.
2. Mamulo vivanta en Sud-Ameriko - Moviĝus per la tiucelaj membroj.
3. Insekso - Serio da gradoj, sisteme k regule aranĝitaj.
4. Orienta brando - Returnite : pronomo.
5. Modifita stato de oksigeno.
6. Sufikso esprimanta la malplej altan gradon de grandeco - Anagramo de "abelo".
7. Ruĝebruna pigmento - Anagramo de "kie".
8. Kolokasio - Pri....=Rilata al la moroj.
9. Unuo de rezistanco - Kinkonoj.

E. LADURON.

KIU ESTIS SINJORO LAROUSSE ?

La 5-an de januaro 1875 oni entombigis en Parizo viron mortintan du tagojn antaŭe, kies nomo estas unu el la plej konataj en Francio (kaj aliloke), kaj kiu restis tamen tre miskonata. Per la malgranda aŭ la granda vortaro, per pluraj enciklopedioj, la nomo Larousse eniris, kiel oni diras, en ĉiujn hejmojn kaj en ĉiujn memorojn, sed oni povus veti, ke por la grandega plimulto, ĝi estas nomo de firmao, sed ne tiu de iu homo.

Tamen la firmao ne estus ekzistinta sen la homo, kaj tre juste en 1975, okaze de la centa datreveno de lia morto, oni prilumis la personecon de Pierre-Athanase Larousse. Tion bonege faris riĉa kaj precizega verko de André Rétif: "Pierre Larousse et son oeuvre", kiu aperis (ĉu necesas diri) en la Larousse librejo.

La aŭtoro plenumis eksterordinaran biografian kaj esploran laboron. Utiligante tion, kion Pierre Larousse mem skribis en siaj unuaj eldonoj - leksikologio, gramatika analizo, pedagogiaj verkoj - aŭ en siaj leteroj, enkadrigante tiun reanimigitan vivon pere de precizaj indicoj pri la materia, politika kaj socia evoluo en Francujo en la 19-a jarcento, André Rétif revivigas surprizigan personecon.

Knabeto de iu vilaĝo en la Yonne, lerninto de malnovaj kaj bonegaj lernejoj, kie formiĝis infanoj kiuj gardadis kontakton kun la vivo kaj la naturo, instruisto forlasinta sian Burgonjon por vivi en Parizo dum jaroj da persona formiĝado, pasia kaj kuraga aŭtodidakto, kiu frekventis bibliotekojn kaj kursojn de la Collège de France, observanto gajnita por la ideoj, sed neniam disigita de tio, kio nutris sian junecan vivon, Pierre Larousse enkorpiĝas ian heroan, sindoneman, kelkfoje unuflankan humanismon, kies grandeco ĉiam superas la mankojn.

Stampita de Proudhon aŭ Michelet, avida je libereco, malamiko de la Dua Imperio, emociita de la "Commune", Pierre Larousse estis idealplena homo. Oni taksis lin revoluciema kaj antireligia. Li ne havis la unuan econ kaj li ekhavis la duan nur en la daŭro de la tempo, sed li ne ĉesis esti, ĝis la fino, postulema kaj obstina moralisto. Jes, oni ĝojas pli bone koni S-ron Larousse !

S. Opsomer.

NI REKOMENDAS

al ĉiuj, kiuj scipovas la germanan, la plej modernan libron pri Esperanto : Richard Shultz : "Europäische Hochsprache oder Sprachimperialismus", 256 paĝoj, Bleicher-Verlag, DM 14,80. La libro enhavas 3 partojn : "De la naciaj lingvoj al la Eŭropa altlingvo (Hochsprache)" -- "La Eŭropa altlingvo : streboj kaj aplikoj" -- "Enkonduko en la altlingvon". La antaŭvorton verkis Prof. Dr. Helmar Frank el Paderborn.

E. Van Damme.

ASTERIX EN ESPERANTO.

La 17-an de marto Hermann Behrmann konferencis dum 6 horoj kun la estr-oj de la granda Eŭropa-eldonejo en Stuttgart (FRG) pri la eldonado de la unua Asterikso-kajero en Esperanto. La ĉefa rezulto : Asterikso n° 1 aperos antaŭ la Universala kongreso en Lucerno, do en julio 1979. Oni planas eldonkvanton de 18000 ekzempleroj kun fortika kovrilo. La Esperanto-Centro de Paderborn prizorgos la disvendadon por Esperantujo. La prezo estos 9,80 GM. (proksimume 170 Bfr.).

Laŭ Speciala Cirkulero n° 33.

SOLVO N°3.

P	L	I	N	E	S	T	O
L	A	N	A	T	I	A	M
O	M	A	R	O	E	R	O
R	O	A	Z	E	N	O	K
O	S	K	O	L	O	K	
I	K	O	N	O	M	I	
P	R	A	O	B	I	O	N
L	U	L	I	A	E	R	O
U	S	O	N	O	K	A	J

LUO..DE..LINGVOKURSOJ.....

- ANGLA - ARABA - ESPERANTA
- FRANCA - ITALA - NOVGREKA
- HISPANA -/RUSA - JUGOSLAVA
- PORTUGALA - GERMANA

- Diskoj kaj kasetiloj ASSIMIL
Tel.: 770.68.44

LINGUADIDAC: str. P. Delacroix, 26
1150 BRUSELO

Mi dankas ĉiujn, kiuj faris rimarkojn aŭ sugestojn rilate la novan aspekton de nia bulteno. Dankon ankaŭ al ĉiuj kunlaborantoj !

Agrablan libertempon al ĉiuj !

Joelle Meijer.

ESPERANTISTOJ

ASSUBEL - ŜPARKASO

(privata ŝparkaso)

metas siajn servojn je via dispoŝo :

- kurantajn kontojn kun eŭroĉekoj kaj garantia karto.
- ŝparlibretojn kun aŭ sen tempolimo.
- diversajn formojn da kaskuponoj.
- hipotekorajtajn pruntedonojn.
- personajn pruntedonojn.
- financadojn.

Por via facileco, turnu vin al ĝia ESPERANTISTA AGENTO : S-ro M. Vanoenacker, rue des Coteaux 284
Wijnheuvelenstraat
1030 Bruselo
Tel : 02/2168488

SOCIOLINGVISTIKAJ PROBLEMOJ EN LA FUNKCIADO DE UNIVERSALA PLANLINGVO :
LA EKZEMPLO DE ESPERANTO (2-A PARTO) Michel DUC GONINAZ
(Université de Provence, Francio).

Multegaj estas la leksikologiaj fenomenoj, kiuj prezentas sociologiajn implikaĵojn (...).

1. La esprimo de la sekŝa diferenco.

Tiu diferenco estas nesimetrii en Esperanto.

a) En la substantivoj, la ineco enhavas informeron plian kompare kun la vireco (la morfemo in) : junulo/junulino, doktoro/doktorino, ĉevalo/ĉevalino ktp. La vira formo ne estas "markita" kaj do aperas kiel pli ĝeneraliĝanta ol la ina. La tre malmultaj substantivoj en kiuj la ineco ne estas indikita signas homojn nur inajn (amazono, nimfo...) kaj do ne posedas viran formon. Tiu ĉi fenomeno de nesimetrieco estas aparte videbla por la bestonomoj, en kiuj la nemarkita formo uzatas samtempe por la masklo kaj por la specio, tiel ke aperas la jena skemo :

ĉevaloj = ĉevaloj + ĉevalinoj

Pro tio oni foje markas la viran formon por ĝin distingi de la specinomo kaj krei ian simetron : virĉevalo, virŝafo... Oni do ricevas la jenan skemon : ĉevaloj = virĉevaloj + ĉevalinoj

Konstateblas eĉ pli kaj pli la tendenco uzi la nemarkitajn formojn por signi funkcion plenumatan eĉ de virino. Oni trovas nun fojfoje :

Sekretario de la Asocio : S-ino Z. (3)

sed oni diras plu : ŝi estas sekretariino.

Tio ŝajne rezultas de la "silenta interkonsento" pri kiu parolis Zamenhof : "ni silente interkonsentis, ke ĉiun fojon, kiam ni parolas ne speciale pri sekso virina, ni povas uzi la viran formon por ambaŭ seksoj" (4). Same, la uzo de ge ne signifas "ambaŭ seksoj kune", kiel instruas la lernolibroj, sed "eksplicita aldono de virinoj". Ĝi ja estas devige uzata en "Gesinjoroj" aŭ "miaj gefratoj, gepatroj..." sed ne en "kongreso de kuracistoj", la "studentoj de nia universitato", "la partoprenantoj de la konferenco".

b) En la pronoma sistemo ekzistas strikta distingo inter seksomarkitaj aludaĵoj (li/ŝi) kaj neseksomarkitaj (ĝi), do devus ekzisti simetrieco inter li kaj ŝi. Sed en la praktiko, li estas malpli markita ol ŝi, ĉar li estas uzata por signi :

- Dion en la unudiaj religioj (vidu la tradukojn de la Biblio kaj Korano) ;

- infanon, konkurence kun ĝi ("Parolante pri infano, pri kiu ni scias, ke ĝi ne estas knabino (aŭ almenaŭ ne scias, ke ĝi estas knabino), ni povas uzi la vorton "li".) (5) ;

- homon, preskaŭ sistemece. Ekzemple : en la oficiala traduko de la Deklaracio de Homaj Rajtoj de UN, li estas sistemece uzata anstataŭ homo, ĉiu aŭ neniu (vd. art. 8, 10, 11, 17, 22, 23, 27)

Li en la praktiko reprezentas do ĉiun ajn homforman estulon, kies sekso ne estas precizigita. La fama principo de sufiĉo kaj neceso signifas sociologie, ke necesas kaj sufiĉas la viroj. La ineco aperas kiel specifajo. Tazio Carlevaro eĉ hipotezis, ke la "ŝi-klaso" estas nur specifajo de la "li-klaso", kiu enhavas ĉiujn estaĵojn kun racio. (6) Tamen, pro la malforta redundanco de Esperanto, tiu virokratio estas malpli videbla ol en aliaj lingvoj.

(daŭrigota)

El : FEOLL - Paderborner Arbeitspapiere.
Institut für Kybernetische Pädagogik.
2-a laborkonferenco - Februaro 1978.

Maakt U zich in Uw belang met Esperanto, als het middel van verstaanbaarmaking tussen de volkeren, bekend en bezoekt U het

INTERNATIONAAL ESPERANTO-MUSEUM
Hofburg, 1010 Wenen, Oostenrijk

Opgericht in 1927 en per kontrakt met het Ministerie van Onderwijs als zelfstandige collectie aan de beroemde österreichische Nationalbibliothek aangesloten.

In de vijf grote zalen (500 m²) krijgt U in een permanente tentoonstelling een overzicht van de verbreiding en bruikbaarheid van de internationale taal Esperanto, die zelfs de twijfelaars moet overtuigen! Meer dan 13.000 boekdelen zijn voorhanden!

Het Museum is Maandag, Woensdag en Vrijdag van 9-15uur vrij toegankelijk. Toegang vanaf de Michaelerplatz, onder de koepel.

C'est de votre propre intérêt de vous familiariser avec l'Espéranto, le moyen de communication international, en visitant le

MUSEE INTERNATIONAL DE L'ESPERANTO
Hofburg, 1010 Vienne, Autriche

Créé en 1927, il forme aujourd'hui - par contrat avec le Ministère de l'Education - une collection indépendante annexée à la célèbre Bibliothèque nationale autrichienne. Dans 5 grandes salles (500 m²), une exposition permanente rend compte de la diffusion et de l'utilité pratique de l'Espéranto, la langue internationale. Elle convaincra même les sceptiques!

Le musée, dont la bibliothèque comprend plus de 13.000 volumes, est ouvert, à titre gratuit, les lundi, mercredi et vendredi de 9-15 heures. Entrée sur la Michaelerplatz, sous la coupole.

ESPERANTO AKTUALA

N-ro 79-06

Edité par

Uitgegeven door

ESPERANTISTA

BRUSELA GRUPO

p/a S-ino J. MEIJER
Gerlachestrato, 52
1040 BRUSELO

Périodique mensuel -

Maandelijkse uitgave



S-no Eduward Symoens
Putsesteenweg, 13-1 A
2180 Kalmthout